

Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44300 NANTES, Francujo

JARABONO

Jarabono : 70 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44300 Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61 L

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1989 - 2

(APRILO-MAJO-JUNIO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... Charles Spencer Chaplin



... kaj « Mumiigaj procedoj »

KULTURAJ KAJEROJ

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jeannine Vincent B.P. 54
49150-Baugé

Komitatanoj :

Pierre Babin

Simone Guillot

ENHAVO

	paĝo
El Gresillon	1
Esperanto tra la Mondo (Frangeul)	2
Bavarujo (S. Boniol)	3-5
Charles Spencer Chaplin	6-7
Mumiigaj procedoj (B. Golden)	8-10
Efiko de parolo (G. Roux)	11-12
Por la Geknaboj (A. Childs-Mee)	13
Por via Distro	14
La vivo en Gresillon	15-16

El Grésillon

La amikoj de la Esperanto-Domo, kiuj interesiĝas pri ĝia vivo certe regule legas la raportojn pri la ĝeneralaj kunvenoj kaj pri la komitatkunvenoj. Inter aliaj informoj, ili legis, ke la prezidanto decidis "emeritiĝi". Tion li faris ĉar li fakte atingis limdaton de retiriĝaĝo kaj konsideras, ke li, kaj lia edzino (ankaŭ ŝi emeritiĝas) sufiĉe longe gvidis la destinon de Gresillon. Jam en 1956 ili prizorgis sian unuan someran staĝon. Poste, ĉiujare, ili deĵoris somere. Dum longaj jaroj la ĵus-eksiĝinto helpis Henri Micard kaj zorgis pri la eldonado de Kulturaj Kajeroj, krom plurajn jarojn, kiam J.P. Guillot estis la ĉefredaktoro. Li, nun jam de kelkaj jaroj, zorgas ankaŭ pri la presado de la revuo.

Kiam, en 1965, Henri Micard metis en liajn manojn la pezan taskon de prezidanto, li ne sciis, ke dum dudek kvin jaroj li estus, ne nur prezidanto, tutjara zorgo, sed ankaŭ, ke li, kaj lia edzino, estus la gedirektoroj de kultura centro, de hotelo, de restoracio kaj de kampara bieno. Ili nun profunde sopiras al vera emeritiĝo.

Ilia espero estas, ke la anstataŭanto trovos la necesan helpon por daŭrigi la laboron. Sen tiu helpo la Esperanto-Domo ne povos longe funkcii kontentige, ĉar necesas enkonduki kelkajn ŝanĝojn en la prizorgado de tio, kio estas, vole nevole, entrepreno.

Lastminute- Ni ĵus estis informitaj pri la forpaso de Justin Benistant, nia amiko de Le Mans. Lia morto multe ĉagrenas nin ĉar li estis amiko de la Esperanto-Domo jam de la komenco. Ĉiam bonhumore li multe helpis Gresillon fari siajn unuajn paŝojn kaj daŭre alportis siajn spertojn de edukisto. Li eĉ instruis la francan lingvon pere de esperanto. Al lia edzino ni diras nian plej amikan ĉagrenon. Al iliaj infanoj ni sendas niajn simpatioplenajn kondolencojn.

Esperanto tra la Mondo

EL SAN-MARINO- Se vi estas sciencisto, profesoro, universitatano, vi devas nepre interesiĝi pri la Akademio Internacia de la Sciencoj, instituto, kiu uzas esperanton. Petu informojn ĉe: AIS, Kleinenberger Weg 16b, D-4790 Paderborn, Germanio.

EL SOVET-UNIO- La ilustrita monata revuo " Soveta Uzbekistano", kiu aperas en 11 lingvoj, entenas, ĉiudumonate, esperantan rubrikon, kun kurso. La adreso de la revuo estas: 41, strato Lenin, Taĉkent, 700000 Uzbekistano, Sovet-Unio. La francoj povas aboni la francan eldonon, sendante 75 ff. al Gilbert Gerrier, 179, rue Ordener, 75018 Paris. Provnumero ricevebla kontraŭ unu respondkupono.

Fine de januaro preskaŭ 300 reprezentantoj de esperanto-grupoj el 115 sovetiaj urboj, kunvenis en Moskvo kaj decidis restarigi "Sovetrespublikara Esperanta Unio" (SEU), kiu malaperis dum la stalina persekutado en 1938. Oni scias, ke ĝis nun funkciis la oficiala Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE), kiu, ŝajne, ne plu ricevis la subtenon de multaj esperantistoj. La nova prezidanto estas Vladimir Samodaj, redaktoro de la araba eldono de la konata plurlingva gazeto "Moskvaj Novaĵoj"; tiu gazeto anoncis la renaskiĝon de SEU.

Jam la iamaj filioj de ASE en Estonio, Latvio kaj Litovio estis eksiĝintaj el ASE kaj refondis naciajn esperanto-asociojn tre aktivajn. Ĉiuokaze oni povas esperi gravan disvolviĝon de la esperanto-movado en Sovet-Unio.

SE VI LOĜAS EN HAVEN-URBO- Sovetiaj esperantistoj preparas surmaran internacian ekspedicion "Columbus 500" sur polimaranoj. La helpo de esperantistoj estas petata ĉar la ekspedicio haltos en tiuj haven-urboj el kiuj venos oficiala invito. Dum la somero 1990 la eŭropa itinero estos: Tallinn, Helsinki, Svedio, Danio, FR Germanio, Nederlando, Belgio, Anglio, Francio, Portugalio, Hispanio. Rilati kun: Prez. Robert Räikkönen, ekspedicio "Columbus 500" Klubo " Vojaĝoj por defendi pacon kaj naturon", pr. Mira 36, SU-129010 Moskva , Sovet-Unio.

EL POLLANDO- La pola kompanio Interpress-Film produktis filmojn en pola lingvo kaj en esperanto. Temas pri la filmoj "Esperanto" (produktita kun bulgara firmao), "La Granda Origino" (en kunlaboro kun Oomoto), kaj en kunlaboro kun Kultura Interŝanĝa Asocio de la ĉina urbo Tai An, "La vizito de la Imperiestro" kaj "Unu miliardo da bastonetoj". La kontrakto estis redaktita en esperanto. La filmojn jam aĉetis la pola televido.

Interpress-Film produktis ankaŭ filmon pri Bjalistoko, en pola lingvo kaj esperanto; ĝi daŭras 50 minutojn kaj ĝia titolo estas "Bonvenon al Bjalistoko". Ĝi celas instigi la esperantistojn viziti la urbon, kie oni konstruos la mondan Zamenhof-Centron

RESTADO ĈE MEDITERANEO- La kultura Esperanto-Centro de Montpellier proponas agrablan ferian semajnon kun la ebleco perfektigi vian scipovon pri esperanto, de la 16-a ĝis la 23-a de septembro 1989. Adreso: Esperanto, 5 rue du Dr. Roux, 34000-Montpellier, Francio. Tiu internacia semajno okazos ek la "Familia Domo" Le Lazaret, en Sète.

EL HISPANIO- Dimanĉon 17-an de septembro okazos la XVII-a Valenciana Renkontiĝo en Alicante: vizito de la urbo, kunveno pri konkretigo de la organizado de Universala Kongreso en Valencio en 1993, frata tagmanĝo. Informas: Centro Social Cultural, Grupo de Esperanto, San Fernando,39,2°, 03001 Alicante.

BAVARUJO

HEJMLANDO POR ROMANTIKULOJ

Post ĵusa vojaĝo al Bavarujo, mi deziras senprokraste omaĝi al tiu patrolando de l'revo kaj belo; senprokraste liveri al komplica notolibro freŝajn impresojn. Ho ve! Al mi plaĉintus revidi Munkenon, suprengrimpi la helikŝtuparon interne de la tiel-nomata "Bavaria"; rigardi la urbon tra la ungaj vitretoj, poste je alto de la okuloj. Plaĉintus viziti la versajlan duplikaton meze de insulo izoliĝantan kaj enakve rebrilantan. Sed sestaga rondveturado bremse bridas vizitemon. Kion fari krom maksimume elprofiti...kaj ĵeti moneron en la Danubon por certiĝi pri rea vojaĝo tien ?

Ekde la unua tago ni baniĝas en romantikismo. En Würzburg mi kliniĝas super malnova tombo de trobadoro sub kreskaĵoj duonkaŝita. Dum mi mankaresas la ŝtonon miaj fingroj eniĝas en florkovritajn etajn kavaĵojn ĉe la neglata surfaco. Laŭ propra volo de la trobadoro - nia gvidisto klarigas - la tombo estis tiel ekipita, por ke el tiuj etaj kavaĵoj la tie flugantaj birdoj povu sensoifiĝi per la entenataj akvo-gutoj. Kia delikateco meze de jarcentoj taksataj kruele krudaj!

Rothenburg, gardanto de pasintaĵoj-

La frankona poeto Jan-Paŭlo Richter diris:" La plej bona romano, la plej bela, eventofekunda, kiun mi iam legis, tio estas historio". Kaj ekde la unuaj paŝoj trans pordego el malglataj ŝtonblokoj la ĝusteco de la diraĵo saltas en la okulojn: tia urbo atestas kaj rakontas. 426-metrojn alta super la marnivelo, ĝi estis dum la mezepoko imperiestra rezidejo, libera imperia urbo kaj ĝia famo kulminis fine de la XIVa jarcento sub urbestro Toppler. Ĉio estas, ĉu gardita, ĉu restaŭrita laŭ la tiama stilo. Ene de dikegaj fortikaĵoj ni laŭiras la pavimitajn stratojn kaj admiras la tipajn domojn. Gajas la koloroj, de flavo ĝis okro, kun de tempo al tempo helverda aŭ roza specimeno. Notindas la triangula formo de la tegmentoj kun alta firsto kaj ambaŭflankaj deklivoj. Malgrandaj vitretoj ĉe la fenestroj; malaltaj lignaj domo-pordoj (ne grandstaturaj estis niaj mezepokaj antaŭuloj), kun malsamaj pordofrapiloj ĉe ĉiu domo (kiel, alie, la malfruiĝintoj povus en nigra nokto retrovi sian propran hejmon, des pli kiam troa glaso da vino malhelpas!). Tamen pli larĝas la enirpordoj por la ĉevaloj destinitaj. Elvokivaj ŝildoj nin allogas, samkiel la surpordaj aŭ superpordaj skulptaĵoj. Prefere ol viziti la subteran turmentejon ni promenadas ĉe sunsubiro laŭlonge de la fortikaĵoj inter kvietaj domoj. Fajfadas nur merloj en tiu vespera paco.

Ho ve! ne prezentos al ni epizodojn de la tridek-jara milito la nepagitaj aktoroj sub la tiamaj kostumoj; ne ĝuos ni la folklorajon sub titolo "majstra glaspleno", kiu rakontas, kiamaniere urbestro dum la XVII-a jarcento savis sian urbon de disrabado: antaŭ la mirigitaj okuloj de la venkintoj li sukcesis eltrinki vino-kvanton po tri litroj kaj duono..Tiajn rekordojn strebis atingi - post longa trejniĝado- la urbaj gravuloj okaze de malfruvesperaj bankedoj. Bonŝance ilin gardis la bulbo-kronitaj preĝejoj. Plurajn similstilajn urbetojn ni traveturos survoje al la "Ludovikaĵoj" kaj ĉiufoje paca gajeco kun pinĉaĵo da iama naivo batigos niajn korojn. Sed antaŭe ni omaĝu al Augsburg, kiu plurfoje akceptis gravajn kongresojn de Esperanto.

Augsburg, atestanto pri historiaj etapoj- Fondita de Aŭgusto imperiestro (impone bela fontano lin rememorigas), ĉefurbo de romia provinco kaj eŭropa grava vojkruciĝo, ĝi mezepoke fariĝis episkopa sidejo kaj dum la XIII-a jarcento akiris statuson de libera imperia urbo. Ĝian blazonon ornamas strobilo. Ne nur imperiestra rezidejo kaj elektita loko por dietaj kunsidoj, ĝi svarmas je ĉiuspecaj artistoj: pentristoj, skulptistoj, muzikistoj (ĝi estas lulilo de la Mozart familio) Se ĝia famo kulminas dum Renesanco, ĝin ankaŭ karakterizas la rokoko stilo, precize alnomata "aŭgsburga".

En la malnovaj kvartaloj, samaj vidindaĵoj, kiel en Rothenburg, kaj sama kortuŝo; sed pli grandproporcia estas la tuto. Ni levas la okulojn al la verdaj bulboj, kiuj kronas multajn preĝejojn, ĉu luteranajn, ĉu katolikajn (unu el ili estis eĉ dividita inter ambaŭ kultoj dum la priplorindaj religiaj militoj...) Multloke disŝprucas fontanakvo meze de skulptitaj scenoj; multloke verdas surtrotuara gazono kaj ombrodonaj arboj; multloke dolĉe odoras je tilio. Ni admiras la altan "domon de la teksistoj" kaj ties freskojn, modernajn,kiuj prezentas korporaciajn kaj militajn temojn.

La gvidisto nin direktas nun al malnova senbrua kvartalo, la tiel-nomata "Fuggerei"; la Fugger dinastio estis la urbaj monpotenculoj, kiuj konstruis tiun kvartalon por la maljunaj senhavuloj, kiuj pagis nur simbolan luprezon. Jen ni eniras laŭvicajn malaltajn domojn kaj dronas en pasinteco. Ni kliniĝas super mallarĝaj litoj per plumonoj kovritaj; ni mankaresas poluritajn surŝrankajn skulptaĵojn, ŝpinradon, apudfajran blovilon; en kuirejo ni malpendigas la paton kaj bakmuldilojn kaj esploras la kuirilaron. Tial estis do dum la bona malnova tempo... Nostalgio nin envolvas dum sur piedpinto ni eldomiĝas.

Nun ekbatas la tagmezo. Ni estas akurataj. Post kelkaj minutoj ektintos Mozart sonorilado kaj ni imagas la mirindinfanon kune kun la fratino, kiu muzikis tute apude sub gvidado de postulema patro; kiu eble trotetis sur la stratoj, kiujn ni ĵus surpaŝis. La tutan urbon ni salutas el la urbodoma salonego sur la unua etaĝo, 17-metrojn longa. Tie kulminas la baroka stilo en abundegaj figuroj. Pli ol unu kilogramo da oro estis bezonata por ornami la plafonon, kie lumrebrilas sennombraj orgarnaĵoj. Mallevante blindigitajn okulojn ni alproksimiĝas al la malfermitaj fenestroj, kiuj rigardas al vasta placo, kerno de la oficiala centro. Majeste impona. Senmanke bela. Ni adiaŭas. Antaŭ ol pilgrimi al la revigaj kasteloj ni konatiĝu kun ties kreinto, tiu fascina Ludoviko la Dua, pri kiu la historiistoj ankoraŭ ne estas fincerbumintaj.

Romantika elinter la romantikuloj

"Multajn belajn florojn bluajn mi trovis sur la montaro kaj mi pensis pri la plezuro, kiun ili estus al vi donintaj. Mirinde malhelbluaj estis kelkaj." Tiel tekstas letereto, kiun la patrino, Maria el Prusujo, sendas al la filo, kune kun bukedo. Kaj respondas li:" Elkoran dankegon pro via ŝatata letero kaj pro la floroj, kiuj veran feliĉon portis al mi." Ĉar malhelbluon, ankaŭ gencianojn, aparte amas li. Ĉu malhelbluo ne estas la koloro plej senmateria, nerealon, eĉ superrealon, naskanta, kvazaŭ oni enpaŝus transspegulen? Tia bluo konstante ornamos la kastelajn ĉambrojn, samkiel la cigno-figuro, tiu birdo samtempe suna kaj luna, duobla simbolo de la lumo blanka, vira kaj ina.

Okjaraĝa, Ludoviko jam vigle interesiĝas pri arkitekturo kaj montriĝas tre lerta en skizofarado. Sed antaŭtimas lia guvernisto:" Endas, ke lian vivemon kaj vivenergion oni vigligu, ke lian melankolion oni kontraŭbatalu." Kaj jen la duan de februaro 1861 la Reĝa Operejo de Munkeno prezentas Lohengrin. Fortan skuon Ludoviko tie ricevas. Li, taksata muziksurda, nekapabla distingi sonaton disde valso, skribas al Vagnero:" Alpreni kiel modelon homon el karno kaj ostoj, bonan kaj ĉiel viglan kaj el li fari gvidanton." La deksesjarulo estas travivinta decidigan vivturniĝon.

Lia unua donaco al Vagnero konsistas el rubeno sur fingroringo mirinde muntita. Rubeno, gemo arda, gemo de l'feliĉo, kiu netuŝante ebriigas. Kaj respondas la ricevinto: "Al vi tiujn larmojn plej paradize emocioplenajn mi sendas, por ke vi eksciu, ke la poezia miraklo, kvazaŭ dia realaĵo, eniris mian povran amavidan vivon. La lastaj poeziaj kaj muzikaj harmonioj de tiu vivo, kaj tiu vivo mem, al vi de nun apartenas." Kaj preskaŭ

dudek jarojn daŭrados pasia interkorespondado. La unua renkontiĝo okazas en la halo de la munkena Rezidejo, de blua brokaĵo tapetita kaj de la barokaj oraĵoj plibeligita. Ludoviko:" Ĉio de vi kreata estas por mi tiel apuda, kun tia afineco min kortuŝas, ke vere paradizan ĝuadon mi travivas." Kaj Vagnero, siavice, koncerne la reĝon:" Li precize tenas for de mi ĉion, kio min rememorigas pri vivo kaj realo; mi jam povas nur revi kaj krei."...Revi kaj krei! Depost 1871, laca je militoj kaj politikumado tiun programon elektas por si la reĝo, for de Munkeno, en la grandioza ŝirmejo de siaj karaj Alpoj.

Glitveturilo lin forportas laŭlonge de la neĝkovritaj deklivoj kaj preterpasanta kamparanino komparas tiun vizion kun tiu de ĉefanĝelo... Alifoje li preferas dumnokte ĝuadi fikcian vojaĝon per cignoforma barketo en cignoforma groto balanciĝanta. Ĝis tagiĝo remadas servisto inter gipsaj rozoj sub ŝanĝiĝemaj lumoj. Homo sendorma, kontraŭ dormemo vigle batalanta; kontraŭ la morto mem li baraktadas en malespero. Ĉar la morto lin fascinas, samkiel la nokto kaj luno. Ĉu li ne mendis por sia dormoĉambro lampegon, kies diversaj pozicioj signas la fazojn de la luno? "La Luno Reĝo" lin titolos nia poeto Apollinaire, ne pro la lampego, sed pro lia sombra animstato, ia stranga miksaĵo el timego kaj altiremo rilate al la misteroj de vivo kaj morto, de lumo kaj mallumo. Ekkrios Verlaine:" Reĝo, la vera kaj unika en tiu jarcento." Kaj tamen nin korŝiras la legado de lia taglibro, liveranta sinsekvon de luktoj kaj malsukcesoj. Nin korŝiras la dialogoj inter Ludoviko kaj la Reĝo: malforta estas la unua, fortoplena la dua. Stranga personeca disduiĝo, stranga antaŭaverto pri la iom-post-ioma difektiĝado de la mensa stato.

Ĉu lin minacas jam nevenkebla familia heredeco? Turmentate de la pligraviĝanta psika malsano de la frato Othon, li pli kaj pli apartiĝos de tiu malfeliĉulo, kiu hunde bojas aŭ publike konfesas neplenumitajn abomenindaĵojn. Al tiu kompatinda familiano li eĉ rifuzos ci-diri. Kaj kiam la frenezuleja kuracisto esploros Othon-on, Ludoviko profetece eksopiros: "Nur ke ankaŭ ĉe mi nenion li malkovru!"

Kaj post ,kelkaj jaroj li sin enŝlosos en plena izoliteco, alparolos en afekta franca lingvo la bustojn de Ludoviko la XIV-a kaj Maria-Antonieta, la tiel-nomataj "gastoj". Li malplenigos dekon da glasoj de ĉampana vino kaj ilin adiaŭos dirante al siaj lakeoj, ke estas ja agrablege frekventi homojn, kiuj venas nur kiam petataj kaj same retiriĝas... Eĉ lia morto similos la lastan akton de baroka dramo. Oni nun hipotezas, ke dum promeno kun la kuracisto, la reĝo, bela kaj fortika, strangolis la kunulon kaj eknaĝonte ĝis la mezo de la lago Starnberg, estis mortbatita de la malvarmaj akvoj pro tro abunda manĝo. Sed nur hipotezi oni povas kaj la vivturmentato verŝajne kunportis la lastan misteron de eksternorma vivosorto.

Simone BONIOL



Charles Spencer CHAPLIN

En malriĉa kvartalo de Londono naskiĝis en 1889 infano, kiu fariĝis homo famkonata. La muzik-komponisto Claude Debussy sendis al li omaĝ-vortojn, kiam li estis nur burleska komedianto:" Vi instinkte estas muzikisto kaj dancisto". Kelkaj artistoj eĉ diris,ke "li superas ĉiujn".

Kiamaniere Charles Spencer Chaplin fariĝis, por la tuta mondo, "Karleto"? Li rakontas, en "Historio de mia vivo", ke, kiam li estis kvinjara, lia patrino, kantistino en londona teatro, subite ne plu povis kanti. La infano estis en la kuliso kaj aŭdis la ridojn kaj fajfojn de la spektantoj, kiuj falsete ekkantis. Li ne tre bone komprenis tion, kio okazas, ĉefe kiam la teatrestro prenis lian manon, kondukis lin sur la scenejon, kaj anoncis al la ĉeestant-aro, ke la knabo kantos anstataŭ la patrino. La orkestro iom hezite trovis la tonon, kiun la infano adoptis. Tiu lasta ekkantis kaj rapide pluvis la moneroj sur la scenejon. Li ĉesis kanti, diris, ke li unue kolektos la monerojn kaj nur poste denove kantos. Ekridoj, aklamoj, plia mono-pluvo; vera "Karleta" sceno, ĉu ne? La tragika gago de la senvoĉa kantistino estas ĝisfunde ekspluatata. La nova komikisto staras kun la ridantoj kontraŭ sia patrino. Kruela situacio; la komiko de Chaplin estos poste tre ofte kruela.

Karleto skribis en "Historio de mia vivo":" Ne necesis al mi legi librojn por lerni, ke la granda temo de la vivo estas lukto kaj sufero. Miaj klaŭnaĵoj instinkte baziĝas sur tiu konstato".

La persono Karleto evoluis tra la jaroj.Ĉe la komenco (1913-1914) li estis cinikulo, sentaŭtaga, malafabla, fanfarona. Same, kiel la tradiciaj marionetoj, la franca Guignol, la angla Punch, la germana Kasperl, li respektis nenion kaj neniun. La burleska komedio permesas ĉiujn spitadojn kontraŭ la justico, la aŭtoritato, la konvenaĵoj. En tiu periodo Karleto turniĝas kun bastono batalema por antaŭgardi sian viv-spacon konstante minacatan kaj konstante rekonkerotan. Chaplin rakontas:" Ĉe la komenco la persono Karleto estis pli libera. Lia cerbo malofte utilis. Li obeis nur instinkton, kiu prizorgis nur pri loĝado, manĝo, varmo. Nur poste la sento tralikiĝis. Iom post iom tenereco anstataŭis malafablecon, timemo anstataŭis agresemon, rido miksiĝis kun emocio. Tamen la unua Karleto pluvivas en "La urbaj lumoj" kaj "Modernaj tempoj".

Al amiko, kiu petis de li, kiun beston li preferas, li respondis: "La lupon". Li adoris sian patrinon kaj vidis ŝin sinki en frenezulecon. Li vidis sian patron morti, nur 37-jara, pro trotrinkado. Li spertis ĉiujn humiligojn de mizero, de malsato, de malvarmo, de timo. Li vidis homojn rezigni ĉian homan dignon. Fakte li bezonis lupan energion por travivi sian junaĝon.

En 1947, responde al la atakoj de la usona gazetistaro kaj de la Komisiono Mac Carthy,li diris: "Mi deklaras militon kontraŭ Hollywood". Ek de 1952 li loĝis en Svisio. La ĉefa temo de liaj kino-verkoj estas tiam la batalo por la vivo. " La vivo havas neniun signifon; ĝi estas nur deziro", diras la klaŭno Calvero en "Limelight" (Planklumoj). De tiam la personoj de liaj filmoj estas gvidataj de fundamenta vivdeziro. La klaŭno Calvero ankaŭ diras:" Mi konas viron, kiu ne havas brakojn; li ludas violonon per la piedoj". Chaplin iam deklaris:" La vivo mem estas stimula sprono...Mi malkovris, ke la ideoj venas, kiam oni spertas fortegan deziron trovi ilin."

Liaj lastaj filmoj montras

personon kompleksan, kiel homo estas. Karleto estas samtempe ne- kaj tro-adaptiĝinta, brilega kaj mallerta, reĝa kaj seneduka, delikata kaj kruda. La lasta sekvenco de la filmo "Planklumoj" estas kvazaŭ lia estetika kaj morala testamento. Calvero, defalinta klaŭno, devas nepre rekonkeri sian publikon. Same kiel Chaplin, kiam li estis kvin-jara, li iras sur la scenejon, kostumita, kiel burleska komedianto, en la blindumaj planklumoj, antaŭ vizaĝoj nerekoneblaj en la fumo. Calvero ĝuas tiujn minutojn gajnitajn kontraŭ la morto. Post rekonkero de sia publiko, kaj de la amo de Terry, la juna dancistino, Calvero mortas en la kuliso. Kaj la kamero montras ĝeneralan planon: proksime kuŝas Calvero kaj Terry surpinte dancas for. Kvankam dancado



forprenas Terry, la du estuloj estas en la sama, eterna, ĝenerala plano. Neniu malespero. Calvero iam diris:" La vivo, same kiel la morto, estas neevitebla."

Kaj por ni, esperantistoj, plia gratulo iras al Karleto: en la filmo "La Diktatoro", ĉiuj surskriboj de la butikoj en la juda kvartalo estas en Esperanto.


Fonto: Encyclopaedia Universalis

****

Laste aperis

- " Nigra Magio ", detektivromano de Deck Dorval. 216 paĝoj.
- " Sociaj aspektoj de la esperanto-movado ". 21 kontribuaĵoj de renomaj aŭtoroj.
- " El la vivo de bervala sentaŭgulo ". Reeldono de la maldeceta epizodaro de Louis Beaucaire.
- " La laŭta vekhorloĝo ", legolibro por progresantoj de Stefan MacGill, kun demandoj, ekzercoj; por aktiva uzo en kursoj.
- " Turstrato 4 ". Reeldono de la "klasika" socia romano de Hans Weinhengst de 1934.
- En la laŭdinda serio de la literaturaj numeroj de "Franca Esperantisto": " Andromaka " de Jean Racine, tradukita de Georges Lagrange; kaj " Komedioj " de Georges Courteline, tradukita de Hervé Gonin.





Mumiigaj procedoj

Kial mumioj estis bezonataj-

Laŭ la religiaj kredoj de la antikvaj egiptoj magia revivigo de mortintoj havis kiel celon ebligi al ili poreternan vivon en iliaj bone meblitaj tomboj. La homa korpo devis esti konservita por loĝigi lá ka-animon okaze de ĝia reveno al la surtera mondo. Sekve de tio, komplika procedaro estis disvolvita ne nur por malhelpi fizikan diseriĝon de la kadavro sed ankaŭ por certigi reviviĝon.



La Dio OZIRISO

La sola rimedo havebla al la egiptanoj por preventi malkomponiĝon, estis sekigado, sed ĝi estas malfacila metodo, ĉar la homa korpo konsistas 75-procente el akvo. En la unua tempo okazis natura mumiiĝo kaŭze de la sekiga efiko de la varma suno kaj la aero en dezertaj regionoj, sed tiu metodo estis tro malrapida kaj ankaŭ necerta. Artefarita varmigo neniam estis uzata fare de la egiptanoj kaj kalcia hidroksido (kaŭstika kalko) ne estis havebla antaŭ la ptolemea periodo, kvankam kalkŝtono estis abunda en la lando.

Pro tio, mumiiĝo rezultanta el natura sekiĝado estis anstataŭigita per enbalzamigado. Tiu ĉi procedo estis rigardata kiel sankta rito, kaj ĝiaj ceremonioj havis gravan religian signifon. Ĉi-speca mumiigo fariĝis bone organizita "negoco", en kiu partoprenis multnombraj metiistoj kaj funkciuloj de temploj. En la sinsekvo de dinastioj variis la metodoj de enbalzamigo, kies teknikaj scioj estis transdonitaj per buŝa tradicio de patro al filo. La ĉef-balzamigisto estis viro kun pastra rango egala al tiu de la ceremonia pastro. Asistis al li alia pastro, surhavanta ŝakal-maskon, kiu personigis la dion Anubo, la patronon de la enbalzamigistoj (bildon sur kovrilpaĝo 2). Tiuj du recitis la sorĉpreĝojn konvenajn por ĉiu fazo de la mumiiga procedo.

Plej frue la balzamiga ĉambro estis provizora vindada tendo aŭ budo, starigita por la 70-taga mumiiga laboro. Ĝi havis la etoson de sanktejo kaj estis nomata "la bela domo", "la domo de purigo" aŭ "la tendo de Dio". En la unua jarmilo a.K. (dum la 21-a 22-a dinastioj) la laborejo de la enbalzamigistoj akiris la formon de daŭra konstruaĵo, ĉambrego situanta en la nekropolo. Tie estis stokitaj diversaj specoj de ĉerkoj kun similaj dekoraĵoj kaj hieroglifaj tekstoj, kiujn familianoj povis elekti, kiam ili mendis unu el la tri gradoj de mumiigo. Inter ili, komplika traktado de la kadavro estis la plej multekosta formo de enbalzamigo. Ankoraŭ unu elspezo estis por la himnoj kaj preĝoj, kiujn la pastroj psalmis dum la mumiigado.

La paŝoj por transformi kadavron en mumion- Nelonge post la morto, la korpo estis portita al la per nefer (domo de mumiigo) aŭ wabet (domo de purigado). La vestaĵoj estas forprenitaj kaj la korpo estas metita sur grandan lignan tabulon. La cerbo estas eltirita tra la naztruoj, sed diference de aliaj organoj, ĝi neniam estis konservita. Entranĉo estas farita

en la abdomenon, kaj la tuta enhavo estas forprenita krom la renoj. Tiam la diafragmo estas trancîta, kaj ĉio estas forigita krom la koro. Post forpreno de la visceroj, la toraka kaj abdomena kavoj estas lavitaj per spicoj kaj palmvino. Tiu ĉi substanco estas farita el suko akirita per entrancĝo en la koron de palmarbo (Raphia vinifera). Por rapidigi sekigadon kaj malhelpi misformiĝon de la korpo, la kavoj estas plenigitaj per provizoraj remburaĵoj: sablo, pajlo, rezino, ĉifonoj, sekigitaj vegetalaj fibroj kaj aliaj substancoj ĉemane haveblaj.

La mumio nun estas preta por sekigado, kiu okupas 40 el la 70 tagoj bezonataj por la tuta mumiiga procedo. La korpo estas metita sur klinitan tabulon kaj kovrita per amaso da seka natrono *. La sekigaj substancoj uzataj en la antikva Egipto estis la salo kaj la natrono. Estas la sakrala * naturo de natrono, kiu determinis ĝian elekton anstataŭ salo. En Egiptio natrono estas natura miksaĵo konsistanta plejparte el natria karbonato kaj natria bikarbonato. Dum la kadavro kuŝadas en natrono, ĝi ricevas la karakterizan grizan aŭ nigran koloron de mumioj, kaj la ledeca haŭto rapide gluiĝas al la ostoj. Tiu ĉi metodo por konservi la homan korpon similas al teknikoj uzataj de la egiptoj por pleki fiŝon. Herodoto kaj Diodoro Sikulo, la du antikvaj aŭtoroj, kiuj priskribis enbalzamigon en Egiptio uzis la saman helenan vorton por ambaŭ procedoj: " tariĥueuo" balzamado, peklado, salumado, konservado.

Post traktado per natrono, la kadavro estas tiel bone senakvigita, ke neniu plua sekigado estas bezonata. Neniu atestaĵo ekzistas pri trempado en bano de natrona solvaĵo por mumiigo, kvankam kelkaj mumioj ŝajnas esti malsekaj, kiam ili estis vinditaj. Kiam la sekigita korpo estas liberigita de natrono, la provizoraj remburaĵoj estas elprenitaj, sed ne forĵetitaj. Poste la korpo estas zorge lavita per akvo kaj palmvino. Rezino aŭ lina tolaĵo trempita en rezino, estas metita en la kranian kavon. Segpolvo, mirho, kelkfoje cepoj, estas zorge envolvitaj en malgrandajn linaĵajn saketojn kaj lokitaj en la abdomenon, kiu estas kunkudrita. Sur ĝin estas metita malgranda plato el oro aŭ abelvakso. La korpo estas frotita per miksaĵo el cedro-oleo, kumino, vakso, natrono, gumo, eble ankaŭ lakto kaj vino, kaj surŝutita per spicoj. Por redoni la vivaspekton al la vizaĝo, la vangoj estas remburitaj per linaĵo, kaj la nazo estas tamponita. Malgrandaj remburaĵoj el linaĵo estas metitaj en la okultruojn, kaj la palpebroj estas fermitaj. Por fortigi la haŭton kaj malhelpi, ke malsekeco eniru la porojn, dika tavolo da rezino estas ŝmirita sur la tutan korpon. Kelkfoje brovoj estas pentritaj sur la vizaĝo aŭ juveloj ornamas la korpon. Ĉiu fingro kaj piedfingro estas aparte vindita. Poste la membroj kaj laste la tuta korpo estas kovritaj per linaj tolaĵoj. Ĉiuj objektoj kaj substancoj uzataj por enbalzamigado estas konservitaj. La remburaĵ-paketoj, forprenitaj el internaĵoj de la sekigita korpo, estas enterigitaj en la apudeco de la tombo. La materialoj uzataj de enbalzamigistoj estas sakralaj kaj ili estas formetitaj en kaŝejojn.

Traktado de la visceroj- Kutime la koro estas lasita en la korpo; kelkfoje ankaŭ la renoj restas tie. Post elpreno de la ceteraj internaj organoj, oni lavas, kaj aparte sekigas ilin, kaj preparas ilin por konservado. Ili estas enmetitaj en ujon kun natrono por periodo de 40 tagoj. Poste ili estas aspergitaj per parfumo kaj traktitaj per rezino. Fine, ili estas envolvitaj en paketoj kaj enmetitaj en kvar kanopaj urnoj*. Ĉiu urno havas kovrilon en la formo de homa aŭ besta kapo. Ili prezentas la filojn de Horuso, la sundio, kiuj defendas la viscerojn kaj protektas la mortinton kontraŭ malsato kaj soifo. La hepato troviĝas en la urno de homkapa Amset, la pulmo en tiu de paviankapa Hapi, la stomako en la urno de Duamutef

kun kapo de hundo aŭ ŝakalo; diversaj organoj de la malsupra korpo havas lokon en la ujo, kies kovrilo montras falk-kapan Kebehsenuf. Tiuj kvar urnoj estas poste metitaj ĉe la kvar anguloj de la sarkofago, en kiu kuŝas la mumio.




Kalkŝtona kanopa urno

Specialaj traktadoj- La ĉi-supra priskribo de enbalzamigo de kadavro prezentas la ĝeneralan sinsekvon de paŝoj, kiujn sekvis la mumiigistoj. Variaĵoj kaj specialaj teknikoj estis enkondukitaj, jen por ke la mumiigita kadavro akiru aspekton plej similan al tiu de la vivinta homo, jen ĉar certaj partoj de la korpo havas gravan signifon en la religio.

Por konservi la trajtojn de la mortinto kaj kontraŭstari al ilia misformiĝo, linaĵoj trempitaj en rezinaj substancoj aŭ kelkfoje rezinoj en la formo de pasto, estis aplikitaj sur la ŝtrumpitan korpon. Tiel la enbalzamigisto povis modli la membrojn kaj eksterajn trajtojn tre precize. En kelkaj kazoj kavoj sub la haŭto estis plenigitaj per koto, sablo, pajlohakaĵo aŭ alia materialo, kaj miksaĵoj el butero kaj natrono, envolvitaj en linaĵon, estis enmetitaj en buŝon kaj vangojn.

En la 6-a dinastio (2407-2260 a.K;) la koro kutime estis forprenita kaj ŝtona anstataŭaĵo estis metita en la korpon. En postaj dinastioj la enbalzamigistoj lavis kaj vindis la koron kaj remetis ĝin en la korpon kune kun kor-amuleto en la formo de skarabeo; tiu ĉi estis envolvita en la eksterajn vindaĵojn de la mumio, same kiel alispecaj amuletoj el ŝtono kaj tajlitaj gemoj. La kor-skarabeo estis farita el verda ŝtono aŭ egipta fajenco kaj servis kiel vivsimbolo. Traktado de la visceroj variis, sed ili nepre devis esti forigitaj el la korpo, ĉar se ili restis, la procezo de malkomponiĝo okazis pli rapide. Laŭ la plej zorgema procedo, la visceroj estis eltiritaj tra entranĉo ĉe la flanko de la kadavro. En la 21-a dinastio (1070-946 a.K.) la kanopaj urnoj ne plu estis uzataj. La korpo estis plenigita per sako el linaĵo enhavanta natronon aŭ pajlohakaĵon, likenojn aŭ segpolvon impregnitan per natrono. En tiun mason estis metitaj la internaj organoj post lavado, kune kun bildoj de la kanopaj diaĵoj. Sanĝoj en la procedo de enbalzamigo okazis ankaŭ pro modifoj en la religia pensado. Post la kulmino de mumiigo inter la jaroj 1570-1080 a.K., la metio degeneris. Ritaj komplikaĵoj anstataŭis metodojn de konservado, kaj implikita serio da vindaĵoj ofte kovris nenion krom korpo enmetita en peĉ-similan materialon sen plua traktado. Kelkfoje la skeleto estis modlita laŭ homa formo per peĉ-rezinoj. Aliaj mumioj estis nura miksita kolektaĵo de vinditaj ostoj, enfermitaj en kartonaĵo *, sur kiu portreto kaj dekoraĵoj formis substituaĵojn de la konservita korpo de pli fruaj generacioj.Kelkaj senskrupulaj mumiigistoj eĉ anstataŭigis ostojn per lignopecoj!



Bernard GOLDEN

kanopa urno:ujo, en kiu la egiptoj konservis la viscerojn de mortintoj.
kartonaĵo:speco de ĉerko, homo-forma, el kungluita papiruso.
natrono:natura hidrata natria karbonato.
sakrala:dediĉita aŭ apartigita por servo aŭ adoro al dioj.
skarabeo:skarabo el ŝtono, fajenco,metalo, uzata kiel amuleto, kaj simbolo de reviviĝo.

Efiko de parolo

Tre longtempe la parola lingvo estis la nura rilata ligilo inter la homoj por la vivnecesaĵoj. Poste ĝi fariĝis fizika plezuro eligi sonojn okazigantajn pli proksimajn rilatojn, komprenon pli nuancigitan, pli agrablan, (kvankam Talleyrand diris, ke la homo uzas lingvon por kaŝi siajn pensojn). Ankaŭ plezuro estas paroli al si mem aŭ al besto por tiu, kiu nekonscie serĉas kontakton kun vivanta estaĵo.

Ankaŭ por la aŭskultanto estas plezuro, plezuro de mensa ĉeesto, plezuro de la bebo, kiu ĉesas plori, kiam ĝi aŭdas plaĉan voĉon. Krom la senco de la vortoj, estas muzika plezuro tiel granda por infanoj, kiuj multe ĝuas la ripetiĝantajn sonojn aŭ frazojn de la specialaj infanecaj versaĵoj aŭ rakontetoj kaj kiuj senfine petas samajn ŝatatajn songrupojn aŭ rakontetojn. Same por plenkreskuloj estas plezuro klopodi partoprenigi, ĝuigi aliajn pri la nuna temo, interŝanĝi ideojn. Pri tio Montaigne (1532-1592) skribis " sian ĝojon froti sian cerbon kontraŭ tiu de alia, sian guston de la kontraŭdiro, kiam la kontraŭulo estas bone edukita, kaj sian plezuron, kiam tiu lasta estas valora homo."

Tute aparta estas la arto de la oratoro, kiu parolas al homamasoj cele al politika aŭ religia propagando aŭ cele al vendado. Pri tiu lasta punkto la legado de " Kredu min, sinjorino!" de Rossetti estas ege interesa.

" Nun, mi rakontas ion al vi!" estas vortoj, kiuj ĉiam vekas la intereson de la aŭdantaro, kiu ajn estas ĝia aĝo kaj la senco enmetita en tiu "io". Rakonti estas vera arto. Iam Homero parolis pri "flugilhavaj vortoj". La bibliaj profetoj en sia bildoplenaj kaj simbolaj rakontoj uzis tiun magion de la vorto. "En la komenco estis la Vorto kaj la Vorto estis kun Dio, kaj la Vorto estis Dio", kiel dirite en la Nova Testamento. Pli malfrue oni legas:" la Vorto enkarniĝis". Sankta Johano, la unua, donis tiun nomon al la dua persono de la Triunuo, dezirante malkovri la sekreton de la eterna generado de la filo de Dio, simila al la produktado de la mensa vorto en niaj intelektoj. Notinde estas, ke Platono konsideris Dion, kiel la fonton de la ideoj. Kelkaj doktrinoj diras: Vorto estas Sorto.

Oni pensas pri la majstro-vorto de la sorĉistoj aŭ bonfara, aŭ malfeliĉiga. Unu Vorto! kaj la malbela bufo fariĝas belega princino aŭ la malbonulo estas tuj ŝtonigita. "Sezamo! malfermu vin!" kaj la pordo malfermiĝas. La kuracisto-sorĉisto prononcas vortojn, kaj la malsano malaperas...

Ankoraŭ nuntempe, la efiko de la vorto estas tre grava. Kelkaj triboj timas la tabu-vortojn; ekz. kiam Kafrinoj viriniĝas, kaj kiam ili edziniĝas, ili devas ne plu prononci iujn vortojn, kiujn ili antaŭe tute libere uzis, pro pli malpli sekretaj kaj malsimplaj rilatoj kun la seksoj kaj supernaturaj fortoj ligitaj al la nomo aŭ ecoj de la edzoj. Tiu potenco atribuita al la Vorto estas eble nekonscia memoro de ĝia origina rita potenco.

De la Antikvaj Tempoj, la plezuro aŭskulti rakontojn estas granda kaj la rakontantoj, oni povas diri la rakontistoj, estis gravaj kaj famaj homoj, en Grekujo, Arabio, Bizanco. La ĉarmo de tiuj rakontoj kuŝis ne nur en ilia enhavo sed ankaŭ en la ripetado de esprimoj, de frazoj, atenditaj de la aŭdantaro, samtempe ripozaj kaj enpenetrintaj en la spiritojn por bone enkapigi la parolan tradicion, en la miksiĝo de poezio, elokventeco kaj ankaŭ de muziko kaj de kanto. Same en sudaj landoj, kiel en nordaj

ekz. la Kalevala modulita dum balancado. Niaj historio-libroj montras al ni trobadorojn kantantajn antaŭ la mezepokaj kastelanoj, kun muzikilo ĉe mane. Tiuj rakontoj estas valora parto de la literatura heredaĵo de ĉiu lando, de ĉiu popolo.

Sukcesplena rakonto devas tuŝi korojn kaj cerbojn, sentemon kaj intelekton per sia temo; povas esti simpla rakonto: gestokanta, folklora, morala; vera rakonto: historia, pri bestoj, pri vojaĝoj; imaga rakonto: poezia, fantazia, anticipa; simbola rakonto: humura. Sed ĉiam ricevema etoso estas necesa kaj parto de la rakonta arto estas kreado de tiu atendata etoso antaŭ ol komenci paroli. Kiu ajn estas la rakonto, propra rakonto de la parolanto aŭ ne, tiu ĉi devas transdoni sian konvinkon sian emocion al la aŭdantaro por ĝin kuntreni, sugestii, partoprenigi. Reciproke, la aŭdantaro influas la parolanton, spronas liajn talentojn Li adaptiĝas al sia aŭdantaro; ne tute konscie li vigliĝas, ludas rolon, mimikas; li fariĝas aktoro.

Dum jarcentoj, transdonitaj parole, la rakontoj vole aŭ nevole aliiĝis aŭ por adaptiĝi al la publiko aŭ por flati la tiaman ŝaton. Iam oni plezure aŭskultis tre longajn rakontojn dum la vesperoj Estis la sola ligilo kun aliaj homoj, aŭ forpasintaj aŭ fremdaj, kiujn nur vojaĝantoj povis priskribi. Pri imagaj rakontoj, oni konstatas similecon de temoj eĉ ĉe tre malproksimaj landoj: unu inter multnombraj pruvoj de la simileco de la homaj konceptoj rilate al la bazaj virtoj. Nuntempe, longaj rakontoj ne plu estas aŭskultataj de plenkreskuloj, nur politikaj kaj religiaj paroladoj aŭ lekcioj.

Tamen, en ne malproksimaj jaroj okazis en Italio, kongres-festivaloj de rakont-kantistoj el ĉiuj partoj de la lando. Tiu tradicio, precipe en Sicilio, originas, laŭ la etnologoj, de rememoro mistera de dia triunuo de la tero kaj printempo de la greka epoko. La unuan dimanĉon de majo okazas strangaj ceremonioj: meze de la ĉiuspecaj konkursoj, procesioj, krioj, preĝoj, parolas la rakont-kantisto, kun ĉe mane gitaro aŭ tre malnova muzikilo uzata de paŝtistoj de Mediteraneo ĝis Hindio: metala triangulo kun langeto vibranta pere de metala najlo, lokita en la buŝo, kiu rolas kiel resonanca kesto.


La plej malnovaj rakontistoj estas la blinduloj kantintaj naŭtagajn preĝojn, de la 8-a de decembro, Senpeka Koncipiteco, ĝis Epifanio. Konservante sian titolon "blinduloj" ili poste estis nur vojaĝantaj kantistoj. En Sicilio la kantistoj elektas temojn kavalirecajn de la X-a ĝis la XIV-a jarcento en kiuj la popoloj esprimas siajn malamojn, dolorojn, deziron de justeco. Tiuj temoj estas renovigitaj por adaptiĝi al nuntempaj okazaĵoj. La rakontistoj estas la parolantaj kaj migrantaj gazetoj; ili parolas pri ĝeneralaj okazaĵoj ne preterpasante la politikon, kaj sociajn problemojn, eĉ kritikante la agadon de la estraro. Ni ne forgesu, ke en Italio, la parolado estas flua, la parolanto aktoro, kiu vivas sian rakonton, transdonas siajn sentojn per ludo de la voĉo, vizaĝesprimoj, emfazaj gestoj tiel impresaj, ke la virinoj forgesas infanojn, hejman laboron, la butikistoj sian klientaron, kaj staras horojn aŭskultante la allogan rakonton, korpremitaj aŭ plengorĝe ridantaj. La kantisto alvenas nun, ne plu sur azeno sed sur "Vespa" aŭ aŭtomobile, kunportante sian laŭtparolilon, gitaron kaj desegnojn klarigantajn la rakontojn. Kelkaj el tiuj rakontoj estas registritaj kaj aŭdeblaj per la radio kaj la televizio.



Enigmoj

① Kio ĝi estas?







② Kiel li nomiĝas?

③ Trovu la diraĵojn:


a



b




c



solvojn ni donos en numero 1989-3

Andrew

④ Aranĝu 23 alumetojn tiel:



nun aliloku du alumetojn por fari pravan aserton.

POR VIA DISTRO

SOLVO DE LA ANTAŬA ENIGMO



	1	2	3	4	5	6	7	8	9
1	R	E	F	O	R	M	E	M	O
2	I	D	O	L	O	■	P	I	R
3	M	U	R	E	K	S	O	■	G
4	A	K	T	O	■	O	S	T	A
5	R	I	■	P	R	I	■	E	N
6	K	S	I	L	O	F	O	N	O
7	I	■	K	A	T	I	N	O	■
8	N	E	O	N	O	■	K	R	E
9	D	E	N	T	R	E	L	O	J
10	A	G	A	O	■	G	O	J	O

LITERA ENIGMO

La solvo konsistas el 77 literoj, kiuj estas numeritaj. La literoj estas troveblaj helpe de la sekvantaj ŝlosilvortoj:

29-66-59-10-11-18-63-64: legomkreskejoj.

53-68-16-59-51-76-14: manĝaĵpreparejo.

61-26-19-51-12-22: manĝaĵo el ovoj.

53-20-45-74-39-5-51-65-24: bongusta fungo.

19-61-55-46-63: manĝata riverfiŝo.

50-36-67-39-5-24-8-30-47: tuba farunaĵo.

21-72-35-57-49-10-45-51-37-4-14: orienta frandaĵo.

52-3-31-34-41-5-10-9: sinapa spicaĵo.

73-33-15-11-35-75: manĝaĵdolĉigilo.

75-69-7028-43-47: sudeŭropa frukto.

27-32-36-42-66-31-22: amerika frukto.

38-44-50-7-77-54-56-9: frukta trinkaĵo.

15-1-69-20-71-13-37-58-17-25: sanigistoj.

23-11-56-6-67-27-40-51-2-4-7-48: sanigiloj.

59-60-71-6-62-17-38-11-7: efikega rimedo.

1-77: deklaro de angla kuracisto.

LA VIVO EN GRESILLON

Ĝenerala Kunveno - Sabaton 8-an de Aprilo 1989

S-ino Vincent prezidas tiun kunvenon, kiu estas malfermata je la 15-a h. S-ro Babin anoncas, ke 243 membroj ĉeestas aŭ estas reprezentataj. Estis registritaj 68 novaj membroj por sumo de 72 000 frankoj. 38 novaj akcioj estis akiritaj de malnovaj membroj. 3 akcioj estis repagitaj. La nova societa kapitalo atingas la sumon 188 500 frankoj. La kasisto, Dominique Babin, prezentas la financan raporton, komentas ĝin kaj respondas al la demandoj. La Esperanto-Domo akceptis la saman nombron da ĉeestantoj, kiel la antaŭan jaron, sed, ĉar neniu staĝo okazis en septembro, la enspezoj iom malkreskis. Kompense malkreskis la elspezoj por nutraĵoj, parte ĉar ni trovis provianton malplikostan. Ankaŭ la salajro-elspezoj malkreskis pro malpli da salajruloj. Impostoj kaj asekuro altiĝis: la nova asekura kontrakto estas pli kompleta. Ankaŭ plialtiĝis la kultur-elspezoj ĉar la repago de la vojaĝ-elspezoj de la eksterlandaj gvidantoj ampleksiĝis. La finjara pluso estas sufiĉe bona: 57 456 frankoj. La enspezoj kaj la elspezoj de la ĉapitro "libro-servo" kreskis, kio montras, ke la esperantistoj estas pli legemaj.

La modernigo kaj prizorgado de la bieno okazigis iom grandajn elspezojn. Oni renovigis du duŝejojn en la kastelo, refaris la verandon, refaris la barilon ĉirkaŭ la banejo, aĉetis video-aparatojn kaj novan lavmaŝinon por la tukoj.

S-ro Babin rimarkigas, ke la ĉeesto-daŭroj mallongiĝas; eĉ ne la duono de la staĝanoj restadas dum kompleta dusemajna periodo. La ŝanĝo de la horaro de la aŭtobuso Le Mans-Saumur devigis nin komenci la staĝojn iun tagon de la semajno krom sabato aŭ dimanĉo. Tio ne estis ebla dum la Printempa Renkonto kaj parte klarigas la malgrandan nombron da partoprenantoj.

S-ino Vincent sugestas, ke la komitato decidu uzi pli modernajn perkorespondajn kursojn. Oni povus plibonigi la ekzistantajn aŭ uzi kursojn eldonitajn de aliaj asocioj.

S-ro Babin, prezidanto de la asocio anoncas, ke, kiel li jam diris antaŭe, li demisias de sia posteno. Li alvokas kandidatiĝojn kaj diras, ke li estas preta helpi la novan prezidanton dum unu jaro.

S-ino Vincent deklaras la kunvenon finita je la 17.10 h.

La sekretario: Guy DAIRON

LIBRO-SERVO

PETU LA KATALOGON DE:

S-ino VINCENT, 26 bis, rue de Milngavie, F-49150 BAUGE

Komitat-kunveno - Dimanĉon 9-an de Aprilo 1989

Ĉeestas la kunvenon: D. kaj P. Babin, F. kaj H. Boyet, S. Bourot, B. Cheverry, G. Dairon, G. Lagrange, P. Métivier, J. Vincent. Senkulpiĝis: J. Bénistant, Y. Bodereau, P. Chevalier, F. Le Magadure, R. Lenel.

Staĝoj 1989- La kunveno de la Komisiono por Eksteraj Rilatoj de TEJO allogis 60 partoprenantojn sed ne ĉiujn por la tuta renkont-daŭro. Entute oni kalkulis 170 tranoktadojn. La etoso estis simpatia, la administrado glata kaj agrabla. Administris: Louis-Nicolas Babin.

La Infan-renkontiĝo ne allogis sufiĉe da partoprenantoj, pârte pro la nova horaro de la aŭtobusoj: nur unu veturas sabate kaj dimanĉe. Pro tio ankaŭ unu el la kurs-gvidantoj, Audrey Childs-Mee, povis alveni nur dimanĉon posttagemze...en La Flèche, kio kaŭzis prokraston de la kurs-serio pri instru-metodoj. La 20 infanoj dispartiĝis en du kursoj, kaj ĉiuj partoprenantoj estis kontentaj. Administris: Pascale Babin.

La Federacia Kongreso okazos en Grésillon la 6-7-8-ajn de Majo.

La nombro da aliĝoj por la somero montras fenomenon ampleksiĝantan: la aliĝantoj ne multe atentas pri la datoj de la staĝoj, interesiĝas pli pri la kursoj ol pri la prelegoj kaj aliĝas pli kaj pli malfrue. Gvidos la kursojn: P. Borowski, Eva Bondart, Dennis Keefe, M.T. Lloancy, D. Moirand, J. Turbillon.
Prelegos: F. Boyet, B. Cheverry, A. Frangeul, G. Lagrange, P. Métivier, F. Roose. Novaj ekskursoj estos proponataj.

Projektoj por 1990- S-ro F. Boyet proponas, ke la programo de 1990 entenu pli da unusemajnajn staĝojn kun intensivaj kursoj. Estus bone organizi unusemajnan staĝon pri instrumetodoj fine de aŭgusto. La junia kunveno de la komitato pritraktos la aferon.

Prizorgaj laboroj- La muroj, fenestroj kaj pordoj de la salono estas tutfreŝe retapetitaj kaj refarbitaj. Dank'al anonima donaco estas eble ankaŭ ŝanĝi la meblaron. Tio povos okazi nur ekde julio kiam la unuaj foteloj estos liveritaj. Espereble venontjare estos eble farbi kaj tapeti la bibliotekon kaj la oficejon.

Diversaĵoj- La komitato pritraktas la proponon faritan de S-ino Vincent dum la ĝenerala kunveno: modernigon de la perkorespondaj kursoj. S. Bourot proponas, ke la Kvinpetalo kaj Gresillon uzu la unuan gradan kurson de la Kultura centro de LA Chaux de Fonds, kiu nun pli taŭgas ol la Grezijona kurso. La duagrada kurso de Grésillon estus uzata de la tri Kulturaj Centroj. Kontaktoj estos faritaj kun C. Gacond en La Chaux de Fonds. La tria grada kurso estos modernigita kaj ampleksigita por fariĝi kompleta preparilo al la Atesto pri Kapableco. S-ro F. Boyet studos la problemon.

La Esperanto-Kursejo de Pisanica (Bulgario) proponis interŝanĝon de esperantistoj. La francoj pagus la restadon en Grésillon, la bulgaroj en Pisanica. Ne certe realigebla ĉi jare. Juanita turbillon prizorgas la projekton.

Pro eksiĝo de la prezidanto estas necese elekti novan. Nur Dominique Babin kandidatiĝas. Li estas unuanime elektita.

La sekretario: Guy Dairon.

NIA KONKURSO

La nombro da partoprenantoj estis en 1988 iom pli granda ol dum la antaŭa jaro. Ĉiuj konkursantoj montriĝis tre lertaj : la unua premiito superas la kvinan nur je 5 poentoj (el 80). La ĝustaj respondoj al la diversaj demandoj aperis en la antaŭa numero de Kulturaj Kajeroj.

Jen la listo de la premiitoj :

1 — Francis LANZ gajnis 1 000 f.d. por restado en Grésillon.

2 — Juanita TURBILLON gajnis 500 f. por restado en Grésillon.

3 — Odette BERNET gajnis 150 f. por aĉetado de libroj.

4 — Fernand BOYET gajnis 100 f. por aĉetado de libroj.

5 — Simone HUMM gajnis 50 f. por aĉetado de libroj.

Demando estis farita al ni pri la utileco de tia konkurso. Krom la plezuro por kelkaj gajni iom da mono la utileco ŝajnas al ni triobla. Unue, ĝi instigas la legantojn legi ankoraŭ pli atente la revuon. Due, instigi ilin ankaŭ tralegi pliajn dokumentojn. Trie, eĉ tiuj, kiuj ne partoprenas la konkurson havas okazon pliriĉigi sian konon de la esperanta movado dank'al la demandoj kaj la respondoj publikigitaj. Ĉu ne sufiĉas tiuj kialoj ?

Denove konkurso estos proponata ek de la numero de la revuo aperonta en marto 1990. Intertempe, konkursoj malpli ampleksaj aperos en la venontaj du numeroj : 1989-3 kaj 1989-4.

ANEKDOTOJ PRI BESTOJ

— Hotelestro ricevis leteron por rezervado de ĉambro kun aparta demando : « Ĉu vi akceptas la hundojn ? ». Li respondis jene : « Jam de tridek jaroj mi estras tiun hotelon ». Dume, neniu hundo ŝtelis eĉ cindrujon ; neniu brultruis littukon per cigaredo. Mi neniam estis devigata voki la policon pro ebria hundo ; nur homoj provis foriri antaŭ ol pagi. Pro tio mi plezure akceptas la hundojn.

P.S. : Se plaĉas al via hundo vi povas akompani lin.

— Fabrikanto de viand-kaĉo por katoj aldonas sur la skatoloj skriban garantion : « Se, neatendite, via kato ne ŝatas tiun produktajon, sendu ĝin al ni. Per revenanta poŝto, vi ricevos multe malpli postuleman katon ».

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aŭstr. ŝil.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (7,50 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (87 kronoj).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (65 mk.).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).

Hispanio : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10ᵉ-D 03003 ALICANTE - (1 400 peset).

Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (15 us. dol.).

Italio : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (190.000 lir.).

Japanio : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2700 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (15 U.S. dol.).

Nederlando : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (25 fl.).

Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (15 us. dol.).

Portugalio : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joâo Conto, 6, R/CA. 1500 Lisboâ.

Svedujo : Sveda Esperanto-Federacio Brunnsgatan 21, S. 11138 Stockholm poŝtkonto : 20123 (70 kr.).

Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (20 frs).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — Nº C.C.P.P. 36.258 Le Gérant : P. BABIN